UNUA KLASO DE LA KURSO DE ESPERANTO UNAM-SEP-DEC-08
Sabato, la 5-an de septembro 2008.
Luis Kordova, luisesperanto@yahoo.com

Hodiau, la 5-an de septembro 2008, dum la 10-a horo matene, komencis la Kurson de Esperanto en la postgradejo de la Jura Fakultato (JF) de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM).



Instruas la kurson, la Profesoro Daniel Moreno (dancxjo_m@yahoo.com), Ĝenerala Sekretario de Meksika Esperanto Federacio (MEF, www.esperanto-mexico.org).

La kurso daŭros ĝis la 5-an de decembro 2008. Pli da informo pri ĝi ĉe:
http://www.derecho.unam.mx/web2/descargas/o-esperanto.pdf
Aŭ
http://cordovaluis.org/blog/2008/08/21/curso-de-esperanto-en-la-unam-2008-ags-dic08/

Entute estas –laŭ mia lasta informo- 20 partoprenantoj en la kurso.

Mi bonvenigis la ĉeestantojn, dirante:

1.- Ke ili estos en bonaj manoj kun la Profesoro Daniel Moreno;

2.- Ke nia revo estas havi Universalan Kongreson de Esperanto (UK) en Meksiko kaj eble en UNAM;

3.- Invitante ilin aliĝi al MEF por pligrandigi la landan asocion de Universala Esperanto Asocio, UEA, www.uea.org), kaj profiti la okazon por mendi librojn, aliĝi al UEA, ktp.

4.- Ke la UK dum 2010 estos en Havano, Kubo (http://www.sierramaestra.cu/esp/noticia/26esperantoidioma08085678.html), kaj ke tiu estos proksima -tempe kaj space- grava evento por partopreni en ĝi.

5.- Ke Esperanto en Meksiko ankoraŭ ne estas tiom forta por ricevi UK-on ĉi tie, kaj ke ni devas ankoraŭ multe labori por Esperanto en nia lando Meksiko.

Pro tio, mi petis ilin profitu la okazon eniri en la mundon de Esperantujo, la mondo kie ni havas *gekuzojn* kaj *geonkloj* ĉie en la mondo.